



Facila Vento

16-a de januaro 2023, numero 6

Redaktas Dmitrij Ŝevĉenko kaj Anna Striganova

Zamenhof-festoj tutmonde: superrigardo en Eventa Servo

Antaŭnelonge okazis en la tuta mondo diversaj eventoj, renkontiĝoj kaj festoj lige kun la Zamenhof-tago, la 15-a de decembro. Por montri la viglecon de tiuj okazoj, la retejo Eventa Servo ekdisponigis specialan paĝon: <https://zamenhof.eventaservo.org>. Ĝi ligas al la serĉilo de Eventa Servo, ĉe kiu jam aperas pli ol 30 rilataj eventoj!



Zamenhof-festoj tra la mondo

La paĝo estas rezulto de kunlaboro inter Yves Nelsteen, komisiito de UEA pri reta agado kaj kunordiganto de la Fonduso Instigo, Fernando Ŝajani, kreinto de Eventa Servo, kaj Lode Van de Velde, eldonisto (Eldonejo Libera).

UEA invitis la Esperanto-komunumon kapti la okazon aldoni al la listo ankaŭ sian eventon aŭ feston ĉirkaŭ la Zamenhof-tago. Ĉu mankas via festo? Aldonu ĝin eĉ nun, ĝi restu en la historio! Instrukcian filmeton pri kiel registriĝi oni vidu ĉe: <https://mallonge.net/es1>. Se restas dubo aŭ se vi spertas praktikan malfacilaĵon, ne hezitu sendi retmesaĝon al kontakto@eventaservo.org.

Ĉu vi ne bone scias, kio estas Eventa Servo kaj kial uzi ĝin por diskonigi viajn eventojn? Legu kaj spektu:

- Ĉu viaj eventoj estas diskonigindaj? Artikolo, kiu aperis en la februara numero de 2020 de la revuo *Esperanto*: <https://mallonge.net/u1>

- Eventa Servo: evoluoj kaj planoj: Artikolo, kiu aperis en la oktobra numero de 2022 de la revuo *Esperanto*: <https://mallonge.net/u2>

- Prezento pri Eventa Servo kun trejnado dum la 3-a Virtuala Kongreso (spektebla ĝis 31-a/01/2023): <https://mallonge.net/u3>

Se vi ne aliĝis al la 3-a Virtuala Kongreso, vi ankoraŭ povas tion fari por ĝui ĝian enhavon: <http://vk.esperanto.net>. Por konstante legi la enhavon de la revuo *Esperanto*, aliĝu al UEA: <https://uea.org/alighoj/alighilo> (aliĝoj kiel MA aŭ DMA estas aparte bonvenaj). La retejon Eventa Servo kaj aliaj retaj agadoj vi subtenas per donacoj al la Fonduso Instigo, sub la aŭspicioj de UEA: <https://instigo.be>.

La 3-a Virtuala Kongreso de Esperanto + Retoso Postkongresa Demandaro

● Fernando Maia

Dankon pro via partopreno en la 3-a Virtuala Kongreso de Esperanto kaj Retoso! Por ekscii vian opinion kaj plibonigi estontajn eventojn, tre gravas viaj respondoj al tiu ĉi demandaro. Ni petas vin plenigi ĝin. Tiel vi bonvole helpas plibonigi la VK-jn: <https://mallonge.net/VK2022> Koran dankon de la organizteamo!




ILEI kaj la Tago de la Esperanta Libro

Por celebri la Zamenhofan feston en decembro 15-a, kiu estas ankaŭ tradicie la Tago de la Esperanta Libro, Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj (ILEI) proponas simblan tutmondan legadon, donante la elekton inter du malsamaj, sed same gravaj kaj signifoplenaj verkoj.

La unua estas la sprita klasika poemaro *La Stranga Butiko*, verkita originale en Esperanto de Raymond Schwartz kaj eldonita en Parizo "dum Decembro de l' krizjaro 1931." Ĝi certe amuze ridetigos nin dum tiu ĉi malfacila tempo kaj esperigos nin pri pli bela estonteco.

La dua estas la novelo *Antimilitisto* (1934), verkita originale en la ĉina de Lusin (Lu Xun), unu el la majstroj de moderna ĉina literaturo kaj fervora esperantisto. Li interalie tradukis al la ĉina la verkojn de la blinda poeto Eroŝenko. Tiu ĉi novelo, inspirita de la homama kaj pacema penso de la ĉina filozofo Mozio, certe multe pensigos nin. La verkojn kaj ties enkondukojn (el vikipedio por Schwartz kaj el ĉina samideano por Lusin) vi povos libere elŝuti el la retejo de ILEI (www.ilei.info).

Vi estas tre bonvenaj legi ambaŭ verkojn aŭ ankaŭ nur parton de unu el ili, laŭ via intereso kaj deziro. Sed bonvole estu spirite kun ni, dum tiu ĉi bela tago de komuna legado.



La 3-a hispanlingva kurso

Progresas la 3-a kurso por hispanparolantoj, amerikano agado de UEA partnere kun TEJO kaj Kolombia Esperanto-Ligo. La varba fazo finiĝis. Ni akiris de tio 431 aliĝintojn.

La kunordigantoj havas ĉi-jare la subtenon de 9 instruistoj: Araceli, Carlos Lopez (Nova), Carlos Velasquillo, Daniel Cotarelo, Luis Obando, Moisés Herrera, Luis Eliver (Nova), Yair (Nova), Doniben.

Ni ne uzis pagatajn reklamilojn por allogi homojn, ni uzas nur Vizaĝlibr-afiŝaĵojn, KEL-retejon kaj "voĉal-voĉon". 342 aliĝis al baza kurso kaj 89 al meznivela kurso.

La landoj estas: Argentino, Bolivio, Brazilo, Bulgario, Kanado, Ĉilio, Kolombio, Kostariko, Ekvadoro, Salvadoro, Hispanio, Usono, Francio, Gvatemalo, Honduro, Meksiko, Peruo, Kongo, Dominika Respubliko, Urugvajo, Venezuelo.

Ĉi-jare alia novaĵo estas, ke ni uzas la socian reton Discord por arigi la grupon. Ni esperas per tio ankaŭ kreskigi la uzon de Discord en UEA. Sed ĉar Discord ne funkcias bone por pli grandaj grupoj, ni ankaŭ uzos Google Meet por la lecionoj.

Maniero subteni la kurson estas donaco al Amerika Fondaĵo de UEA

<https://uea.org/alighoj/donacoj/ameriko> – bona celo estus akiri 4000 EUR, ĉar tio helpas pri ĉiuj kostoj, inkluzive de aliĝo de kursanoj. Sed mi ne estas tre spera pri tiu atingi, tamen.

Aperis la januara numero de la revuo Esperanto

La enhavlisto de la januara numero:

- 3 | Novjara mesaĝo de la Prezidanto de UEA
- 5 | Malferme: Malferme kun Amri Wandel – Vicprezidanto de UEA
- 6 | Kulturo: "Gloria Artis": pola ministeria medalo por Roman Dobrzyński
- 7 | Ĉu partopreni Universalan kongreson de UEA en Torino? Jes, valoras veturi al Torino en la venonta julio!
- 8 | Rete | Intervjuo: Eventa Servo disvastigos informojn pri Esperanto-eventoj per Esperanto events
- 9 | Universala Kongreso: Gastronomio en Torino
- 10 | ILEI: La 56-a Kongreso de ILEI

- 11 | Eventoj: Varbi kaj instrui: pilieroj cele al postpandemia restarto
- 12 | Teatraĵo en Esperanto: «1910»
- 16 | 10-a Azia-Oceania Kongreso «Novan Vojon post Pandemio»
- 18 | Universala Kongreso: Torino senpacience atendas nin ĉiujn!
- 19 | Laste Aperis
- 20 | Landa agado: Finita ciferecigo de kroataj gazetoj
- 21 | Eventoj: Gravitaĵ ondoj kaj surteraj rondo
- 21 | Oficiala Informilo
- 22 | Afriko brilas: Germano vizitis la Asocion Nova Familio, Goma, DR Kongo
- 23 | Forpaso



Frederic el Germanio vizitis la Asocio Nova Familio en novembro 2022

Malgraŭ danĝera kaj tre malfacila situacio kiu daŭre regas en la regiono ĉirkaŭ kaj en la urbo Goma kun pafadoj kaj luktoj de la rebeloj, germana studento Frederic Düe kuraĝis veturi al DR Kongo por viziti anojn kaj gastfamiliojn de la georfoj de la Asocio Nova Familio. Kune kun Betti (ANF) li prezentis fotojn kaj rakontis pri tiu vojaĝo dum la VK3 (27-an de novembro 2022).



La prezento spekteblas ĉe Jutubo: https://youtu.be/Rq0zH_dzPt8


Afrika Kongreso de Esperanto en Senegal

De la 26-a ĝis la 30-a de decembro 2022 okazis la 8-a Afrika Kongreso de Esperanto (AKE) en Tieso, Senegal, sub la temo "Esperanto – ŝanco kaj ne minaco por Afriko": <https://eventa-servo.org/e/8-ake>.

UEA finance subtenis la kongreson.



Vi povas elŝuti kurierojn Facila Vento de 3-a Virtuala Kongreso 2022 (kaj ankaŭ de la du antaŭaj) ĉe la <https://revuoesperanto.org>



Alianco 365 estas plano por monata konstanta donacado al UEA. La celo de la plano estas garantii al nia Asocio financan ekvilibron, kontribuante por pozitiva jara rezulto, kio signifas daŭripove ebligi al UEA plenumi sian mision. Laŭ tiu plano donacantoj pretas donaci po 31 EUR monate al la Asocio, kio egalas donaci po nur 1 EUR tage. Alternative donacantoj povas fari unufojan donacon de 365 EUR por la kuranta jaro.

Kiel donaci?

Per banko:

UEA-konto en ING Bank,
Postbus 1800,
NL-1000 BV Amsterdam
(IBAN: NL72 INGB 0000 3789 64,
BIC/SWIFT: INGBNL2A)

Per Paypal: vidu detalajn instrukciojn ĉe la Reta Revuo –

https://revuoesperanto.org/alianco_365.



La 3-a Virtuala Kongreso plu viziteblas ĝis 31.1.2023

Escepte en 2022 UEA okazigis du kongresojn samjare. Sekve de la sukcesaj Virtualaj Kongresoj en 2020 kaj 2021, la Estraro iniciatis ĉi-jare samformatan kvar-tagan trian Virtualan Kongreson (VK3) en novembro, aldone al la UK en Montrealo. Pro la multaj aliaj okupoj de la estraranoj kaj de la teknika organizanto – E@I – la preparoj okazis relative lastmomente, sed la rezulto estis tre sukcesa. Nun tiu unika kongreso estas plu vizitebla ĝis la fino de januaro. Novaj VK-aligoj estas senpagaj kun membriĝo en UEA por 2023, kion eblas komforte fari en la VK-aligilo: vk.esperanto.net/2022.

Aliĝis pli ol 1450 personoj kaj efektive partoprenis preskaŭ mil. La programo estis ege abunda kun pli ol 300 programeroj. Paralele okazis Retoso-2 de TEJO, kun 50 programeroj. Daŭre la aliĝintoj povos spekti la kongreson, ĉar la cent plej gravaj programeroj restos videblaj ĝis la fino de la jaro kaj sekve estos videblaj en la jutuba kanalo UEAviva. Por re-spekti tiujn cent programerojn sufiĉas iri al <https://vk.retevent.com/programo?t=talks>. Plej popularaj estis la Inaŭguro kaj la fermo! de VK3, kiujn spektis realtempe pli ol cent personoj. Pluraj aliaj programeroj okazis vive, dum multaj aliaj estis reprojekciigitaj el la Montreala UK. Okazis du sesioj pri strategia planado kun vigla partopreno. Pluraj programeroj okazis en du malsamaj horoj por kuraĝigi pli internacian partoprenon. Malfermis la kongresan temon prelego “Lingvo, vivo, tero: Jardeko de Indiĝenaj Lingvoj”.

Riĉa estis la kultura programo. Eblas ĝui la muzikalon de TEJO “June kaj kune”, la koncertojn “Nokta ŝoforo” de Yves Desrosiers kaj Banĝo-Esperanto de Armel Amiot registritajn en Montrealo, la teatraĵon “Tempo Rabita” de Luiza Carol, kurson de parolarto #forlaflato: lernu prelegi en dek simplaj paŝoj, la premio-ceremonion de la INK-konkurso kaj plurajn programerojn de TEJO serĉante la programon kun “Retoso”.

Menciindas cetere la movada dimensio de la VK. Spektu inter alie prelegojn 135-jariĝo de Hector Hodler: la valoroj de la fondinto de UEA por la nuntempo, Lidia Zamenhof – 80 jarojn post ŝia tragika perejo kaj informojn pri senpagaj reklamoj, Dum la VK okazis kunvenoj de kelkaj kontinentaj komisionoj, pri UNES-

KO (Festivalo por la paco en Tolosa), de la Akademio (prezento kaj respondoj) kaj “Babilu kun” pluraj estraranoj – Duncan Charters, Fernando Maia Jr., François Lo Jacomo kaj Amri Wandel.

Interalie estis remontrita la prelegoj de la Internacia Kongresa Universitato kaj de la Scienca Kafejo okazintaj hibride kaj registritaj en Montrealo. Entute okazis en la VK3 14 sciencaj prelegoj. Por re-spekti la scienca programon eblas serĉi en la program-platformo Retevent la eventojn “IKU” aŭ “Kafejo”. Kadre de Retoso okazis KonSciU – Konkurso Scienca, dum kiu junuloj prezentis siajn esplorojn. Ankaŭ la fakaj asocioj kaj grupoj havis multajn eblecojn prezen ti sin, kadre de la Virtuala Movada Foiro. Estis remontrita la Faka Forumo de Montrealo. Re-spektu ankaŭ prelegon pri la agado de CED Invit’ al interlingvistiko!

La Virtualaj Kongresoj estas la respondo de UEA al la post-pandemia mondo, en kiu virtualaj kaj hibridaj konferencoj plimultiĝas kaj ebligas partoprenon sen vojaĝi. Por la E-movado tio estas freŝa vento, kiu ebligas al multaj esperantistoj kiuj antaŭe ne povis tion fari sperti internacian kongreson. Tiun direkton UEA planas estonte plivastigi per pli hibrida UK kaj okazigo de la VK ĉiujare. Por senpage ĝui aliron al la pli ol 100 programeroj spektblaj, sufiĉas esti membro de UEA. Se vi ne estis aliĝinta al VK3, necesas aliĝi al UEA por 2023 (<https://uea.org/aligoj> aŭ per la VK-aligilo).



“Ekskurso en Seulo”

● So Jinsu

Jen estas filmeto “Ekskurso en Seulo”, kiun mi prezentis okaze de la 3-a Virtuala Kongreso de Esperanto.
https://youtu.be/T3_JRva5xhU

